Membro de la LEA-Komitato de SAT (Parizo)

23 (3 / 1998) LEA/G

MAGAZINO

Organo de la Libera Esperanto-Asocio por germanlingvaj regionoj
*Organ des Freien Esperanto-Bundes für deutschsprachige Gebiete*

# *Junaj homoj al la «Fronto»*

Kiu estas «juna homo»? Mi opinias, ke ĉiu homo ĉu virina ĉu vira estas tiel juna kiel ŝi/li sentas sin. Per «fronto» mi volas diri, ke ekzemple estraranoj aktivas en la unua vico por organizaĵo. Malgraŭ ĉio la maljuniĝo kaŭzas eluziĝon de la fortoj. La proprakorpa substanco kaj la grizaj ĉeloj malgrandiĝas.

Kiam mi hejmen revenis en la jaro 1948 el la militkaptiteco en Egiptio, kie mi lernis Esperanton per lernolibro, kiun mi trovis en pakaĵo de la Svisa Ruĝa Kruco, mi komencis aktivi por la lingvo kadre de la loka Esperanto-grupo. Baldaŭ mi ekkonis, ke la aktivectereno por mi estas tiu de SAT; mi tuj aliĝis. Solidaraj asocianoj estis, kies koncepto por la vivo tre plaĉis (ankoraŭ plaĉas) al mi.

En 1956 SAT-membroj en Germanio fondis memstaran al SAT ligitan asocion: la **Liberan Esperanto-Asocion (LEA/G)**. Dum multaj jaroj Hans Pillekamp† estis prezidanto de la asocio. Li estis mia mentoro pri aktiveco ne nur por SAT kiel honorofica peranto, sed ankaŭ por LEA/G. Post la bedaŭrinda morto de Eduard Weichmann, Dortmund, mi transprenis la taskojn de la asocia prezidanto. Do, ĉion mi prilaboris/-as kiel juna homo, malgraŭ mia profesio.

Kial mi skribas ĉi tion? Mi opinias, ke venis la tempo, kiam mi devas pripensi pri anstataŭanto, kiu estas pli juna ol mi. Feliĉe mi jam trovis relative junan esperantiston por la funkcio de redaktoro de *Magazino*, Gary Mickle, Berlino, kiu tre bone redaktas la LEA/G-organon; li tuj konceptis la karakteron kaj taskojn de LEA/G kaj ĝia membraro. Mi ne forgesu mencii Jiri Proskovec, Dortmund, kiu jam antaŭ jaroj transprenis mian laboron kiel SAT-peranto.

En marto venontan jaron LEA/G-anoj voĉdonu por nova aŭ ĝisnuna estraro. Eble ĝis tiam la asocio trovos relative junajn homojn, kiuj transprenos funkciojn: prezidanto, anstataŭanto, kasisto, konsilantoj. Mi ĝojos, kiam iu anoncos sian pretecon. Se ne, la ĝisnunaj estrargrizuloj devos daŭrigi laboron ĝis la fino! Bonvolu neniu levi la fingron kaj plendi, ke ni maljunuloj ne «foriĝas el la estrarfoteloj»!

Albert Stephan

## Eblas atingi la redakcion retpoŝte!

Mi ĝojas anonci, ke mi finfine per la aĉeto de nova komputilo sukcesis supervenki plurajn (komputil-)aparatarajn problemojn, kiujn mi antaŭe frontis, interalie tiun de la eniro en Interreton.

Per mia nuna retpoŝta adreso eblas rapide kontakti la redakcion kaj min persone:

101.121591@germanynet.de

Bv. profiti de tiu adreso, se vi havas aliron al la reto. Cetere, mi bonvenigas sugestojn rilate al interretejoj / paĝaroj, kiujn konsulti povus esti por mi utile ĉe la redaktado de la *Magazino*. Kompreneble, mi jam konas kelkajn aferojn, sed nur eron de tio, kio eventuale utilus.

GM


## *Apernotoj* / Impressum

*Eldonanto* / Herausgeber:
*Libera Esperanto-Asocio por germanlingvaj regionoj (LEA/G)*/ Freier Esperanto-Bund für deutschsprachige Gebiete (LEA/G)
*Renchener Str. 47, DE-77704 Oberkirch, (Tel.+Fax: (07802) 90 336)*
*LEA/G per SAT en TTT:*
*http://www.worldnet.net/~sat-esp/*
*Redakcio* / Redaktion:
*Gary Mickle (G.M.), Brüsseler Str. 6, DE-13353 Berlin, (Tel.: (030) 453 96 47),*
*retadreso* / Internet-Adresse:
*101.121591@germanynet.de*
*Hans Rodewig (H.R.), Stammestr. 86D, DE-30459 Hannover*
*Albert Stephan (AFS), adreso de LEA/G supre indikita* / oben angegebene Adresse von LEA/G
*Aŭtoroj responsas mem pri siaj artikoloj; la redakcio havas la rajton mallongigi aŭ rifuzi alsendaĵojn.*
*Redaktofino: mezo de marto, junio, oktobro, decembro*
*MAGAZINO aperas kvarfoje jare* / erscheint vier Mal jährlich;
*abonprezo* / Bezugspreis *15,- DM*
*La membrokotizo entenas liveradon de la bulteno.*
*LEA/G-konto: Sonderkonto Kersting n-ro 416 210-432 Postbank Essen (BLZ 360 100 43)*
*Represo de materialo permesita, se la fonto estas indikita.*


## Anonctarifo

Foliumante la nunan kaj la lastan eldonon de la *Magazino*, en kiuj troviĝas multe da anoncoj kaj anoncetoj, la leganto povas demandi al si, kia estas la anonctarifo. La nuda vero estas, ke ni ne havas ion tian. Ĝis nun ni akceptis aperigi anoncojn, kiam petoj pri tio venis al ni. Kompreneble, ni rezervas al ni la rajton fiksi anonctarifon, alivorte, postuli pagon, se aperos bezono. Tia certe aperus en la kazo de pure komercaj anoncoj. Sed tio, kion ni ĝis nun ricevis, ne devigas nin rompi al ni la kapon pri tarifo. Ni aparte volonte aperigas anoncojn de SAT-proksimaj kaj politike proksimaj grupoj kaj iniciatoj.

*Legantojn* de la *Magazino* – abonantojn kaj LEA/G-membrojn – ni cetere *invitas* uzi ĝiajn paĝojn por aperigo de privataj, nekomercaj (t.e. ne profitcele komercaj) anoncetoj ĝis 15 aŭ 20 linioj. Tiun servon ni volonte plenumas senpage. Vi povas sendi anoncetojn al la berlina redakcia adreso.

Mi mem lokas du privatajn anoncetojn en ĉi tiu numero.

GM



# SOLIDARECO

Mi legis en *SLEA-Informilo* de la Sveda Laborista Esperanto-Asocio, en la eldono de junio 1998, artikolon de la sekretario Pelle Persson pri la financa situacio. Li skribis: 'La kaŭzo de la ekonomia saneco en SLEA estas, ke kamarado Yngve Nilsson, nia multjara prezidanto (nun morta) kun apogo de sia edzino Anna-Lisa testamentis sian tutan havaĵon al SLEA...

K-do Yngve ankaŭ estis membro de la neŭtrala Esperanto-movado, sed al tiu organizaĵo li heredigis nenion. Laŭ la informoj kiujn mi ricevis de Yngve pri sia membreco en la neŭtrala ... movado, mi tute komprenas kial SLEA iĝis la sola heredanto. K-do Yngve estis fervora SAT-ano kaj mi estas tutcerta ke ... lia elekto (subteni Esperanto-movadon – la red.) estus favora al SAT.

La ekonomia krizo en SAT ne estiĝis pro mallerta ekonomia prizorgado, sed pro SOLIDARECO. La fakto estas ke ĉiuj novaliĝintaj SAT-membroj venintaj el ekster la okcident-monda ekonomio donas deficiton al SAT, ĉar iliaj membrokotizoj kovras nur ereton de la elspezoj kiujn SAT havas pro tiuj niaj gekamaradoj.

SAT estas organizaĵo kiu batalas kontraŭ la sovaĝa kapitalismo kaj pro tio kompreneble ne volas sekvi la kapitalismajn ekonomiajn ludregulojn, kiuj dirus, ke ni (forgesu – la red.) niajn gekdojn en nepagipovaj landoj.

Tutcerte SAT venis en 'sakstraton' kaj oni nun laboregas por eliri ĝin per varbado de novaj membroj en la okcidenta mondo. La pliigo de tiu anaro estas la kondiĉo por la pluvivo de SAT...'

Same kiel Pelle· al SLEA-anoj mi apelacias al ĉiu LEA/G-ano kiu ankoraŭ ne estas SAT-ano, ALIĜI AL SAT! SAT ne malaperu, ni praktiku SOLIDARAN INTERHELPON! Ne nur per testamento sed ankaŭ dum vivo-tempo.

Albert Stephan
*LEA/G-prezidanto*

***La nun brule aktuala situacio en Kosovo estis temo de ĉi tiu alvoko, kiun la Kataluna Esperanto-Asocio KEA sendis tra la Interreto jam la 24an de marto:***

**KOSOVO: NI EVITU NOVAN GENOCIDON EN EŬROPO!**

# PACO KAJ LIBERECO EN KOSOVO

### LA KIALO DE NIA KAMPANJO

***Pravigo:***

Esperanto estas planlingvo iniciatita en 1887 per projekto de d-ro Lazaro Ludoviko Zamenhof kiel egalisma perilo por la kompreniĝo inter homoj diverskulturaj.

Ekde la eldono de la unua gramatiko de la lingvo kreiĝis inter la esperantistoj translimaj solidaraj ligoj, eĉ en militaj situacioj aŭ dum gravaj sociaj krizoj. La katalunaj esperantistoj estas bona ekzemplo pri tio, ĉar dum sia 90-jara

ekzistado la kataluna esperanto-movado travivis grandajn malfacilaĵojn, paralelajn al tiuj de sia lando. El ĉiuj ĉi plej elstaras tiu de la interna milito (1936-1939), dum kiu Kataluna Esperantista Federacio (fondita en 1910 kaj rekta antaŭulo de la nuna Kataluna Esperanto-Asocio) restis fidela al la konstitucia leĝeco kunlaborante ĝis la lasta momento kun la kataluna registaro kaj alvokante eksterlanden al solidariĝo. Tiu agado efektive sukcesis, kiel pruvas la reeĥoj en la tiutempa esperantista gazetaro, la sendado de humana helpo kaj la donado de rifuĝo al elpelitoj.

Hodiaŭ en Kosovo oni agresis parton de la tiea loĝantaro pro la nura fakto, ke ĝi havas lingvon kaj kulturon malplimultan en la kadro de la ŝtato, al kiu ĝi apartenas.

Kiel esperantistoj kaj kiel katalunoj ni sentas nin duoble devigitaj iniciati agadon reflektantan nian engaĝiĝon kun civitismo kaj helpantan haltigi agreson de ŝtato fifama pro la brutalaj konfliktoj, kiujn ĝi kaŭzis en la lastaj jaroj.

### Antecedentoj

La unua humana iniciato de la katalunaj esperantistoj estis la akcepto de aŭstraj milit-orfoj en 1920.

Multe pli proksime, la katalunaj esperantistoj tenis aparte fruktodonajn rilatojn kun Balkanio: ni memoru la fondiĝon de Kataluna Esperanto-Junularo en Zagrebo (Kroatio) en 1978, kaj la starigon de grava Kontrakto de Kunlaboro inter ĉi tiu asocio kaj Bulgara Esperanto-Junularo en 1986.

Multe pli grava estas la kunlaboro inter Kataluna Esperanto-Asocio kaj Esperanto-Ligo de Bosnio kaj Hercegovino, komencita en 1995. Ĉis nun kiel plej atendindaj rezultoj oni citu la unumonatan restadon de 30 bosniaj gejunuloj ĉe ni en 1996, la eldonadon en Katalunio de la revuo de ELBH, *Bosnia lilio*, kaj la eldono kun ELBH de la libro *Spite al ĉio, Bosnio*, kompilaĵo de la elsendoj en esperanto de Radio Sarajevo dum la sieĝo de la urbo. Kataluna Esperanto-Asocio aparte kontentas pri tio, ke ĝia iniciato kaj perado permesis ankaŭ al la urboj Santa Perpètua de Mogoda (Katalunio) kaj Tesanj (Bosnio) starigi kunlaboron, kiu eble permesos rekonstrui la hospitalon de la bosnia urbo.

### Celoj

La tujaj celoj de nia asocio estas:

- Diskonigi la senigon de la homaj rajtoj al la grandega plimulto de la Kosova loĝantaro, lingve kaj kulture albanaj, fare de la jugoslava ŝtato, kiel abunde registras de antaŭ pluraj jaroj tiel fidindaj organizaĵoj kiel Amnestio Internacia kaj Human Rights Watch.
- Diskonigi la amasmurdojn kaj la perfortojn kontraŭ la loĝantaro fare de la jugoslava armeo en Kosovo, kio montras refojan provon de etna purigado en la regiono.

Ni kredas, ke en la nuna situacio la plej efektiva formo haltigi la novan serban agreson estas la konsciiĝo kaj la engaĝiĝo de ĉiuj civitanoj por premi la registarojn. Necesas ellerni la Bosnian lecionon kaj tuj reagi por malhelpi, ke la konflikto pliakriĝu aŭ ke ĝi eĉ fine bruligu la tutan regionon.

*Hector Alos i Font*
*Kataluna Esperanto-Asocio (KEA)*
*elektronika posxto: < kea@stel.net >*
*URL:*
*< http://www.stel.net/esperanto/kosovo/ >*



# La Internacia Lingvo (Esperanto, Ilo) kiel preventilo de la noosfero

**d-ro med. Wolfgang GUNTHER** *(Akademio Internacia de la Sciencoj [AIS], San Marino, kaj Centro pri Ekologia Medicino [EKOMED], Ahnatal [FRG])*

**Resumo**

*La publikaĵo informas kaj traktas pri la nocio de la noosfero kiel koncepto de la homa idento surbaze kaj elflue de daŭripova memorganiza kaj memkonserva pensa viva materio (la viva). Preventado estas ĉefa trajto de tiuj memfunkcioj. La Internacia Lingvo estas prezentata kiel unu el la malmultaj atingaĵoj de la homa kulturo, kiu laŭkvalite kaj laŭkvante plenumas la kondiĉon esti imanente preventiva.*

La ideo, ke la viva materio esence diferencas de la malviva, estas ĉiama temo de tio, kion ni hodiaŭ nomas interdisciplineco en la mondo de kulturo, aparte tiu de scienco kaj tekniko. Kaj ĝuste la fenomeno de kulturo, kiu diferencigas la konscian kaj scian *homo sapiens* de la cetera viva materio, donis kaŭzon por kelkaj konceptoj pri la noosfero.

La nocio «noosfero» (= sfero de la racio) estas pluevoluaĵo el tiu de «biosfero». Bazajn informojn pri tio liveras la artikolo *Esperanto kiel noosfera fenomeno* de N. Gudskov[1]. La unua, kiu sufiĉe klarvide prezentis la noosferan ideon, estis W. Vernadski[2]. Laŭ ĉefe geologiaj, geokemiaj kaj biologiaj esploroj la biosfero estas rigardata kiel unueca fenomeno, apartiĝa de la malviva. El ĝi grad-grade evoluas la homa socio kiel geologia forto kun ĉiuj ebloj detrui aŭ prosperigi la Plenedon pro la povo influi la lastan ĝis la skalo de la cirkulado de la atomoj. Tiu evoluo de la homa, ĉefe science dependa socio al «estonta unueco de la homaj organizoj kiel tuteca agadstrukturo»[1] kompreneblas kiel natur-kultura proceso al pli kaj pli efika kaj pli daŭripova memorganizado kaj memkonserva tutsistemo «Planedo Tero». Ĉefaj gvidaj trajtoj en tiu evoluo estas la objektiva scienceco kaj la subjektiva interkonsenta akceptemo de la sociaj agantoj. Finfine la taŭgeco de iu ajn kultura evoluintaĵo kadre de la noosfero dependas de ĝia konformeco al la bazaj bezonoj de memorganizado kaj memkonservado de la sistemo Tero. Jen la devenpunkto de la sekve elmontrita valoro de la Internacia Lingvo (Esperanto, ILo).

1. La utiligado de la Internacia Lingvo kiel universala interkomunikilo kaj interkompreniĝilo estas esenca parto de aktiva neŭtraleco. Ĝi funkcias laŭ la principo de demokratia dulingveco: «Ĉiu parolas minimume du lingvojn, la gepatran kaj la Internacian Lingvon.» Sen perdo de lingva kompetento estas ĉi-pere ekskludata ĉia supereco de iu etna lingvo [3].

2. Esperanto estas unu el la malmultaj produktoj de la homa kulturo, kiu estas imanente prevent(iv)a. Ĝia utiligado signifas agadon konforme al la reguloj, laŭ kiuj la biosfero sin mem organizas, konservas kaj evoluigas. [4, 5].

3. La kunvivado de individuoj, popoloj, etnoj, kulturoj ktp. fundamentas sur la tri kolonoj paco, Homaj Rajtoj kaj integra biosfero. Nemalhavebla ĝenerala antaŭkondiĉo por taŭga kaj daŭrema (t.e. daŭripova) interkompreniĝo estas vero, t.e. objektiveco, kaj reciproka toleremo.

4. Komence de la tria jarmilo la sociala kaj etna krizoj kondukas la homaron en mezureble pliiĝantan ekologian krizon, kiu minacas la integron de la biosfero [6, 7, 8]. La viva, t.e. la viva materio, por si mem estas en morta danĝero. Fono kaj kaŭzo de

tiuj grandparte jam neripareblaj detruoj estas kultura krizo de la homo: La ozontruo tieldire estas kulturtruo. La krizo konsistas el malakordo inter jam pli altaj konscio kaj scio unuflanke kaj aliflanke agado, ankoraŭ karakterizata per malnovaj percepto-modeloj kaj valordecidoj. La nun aktuala agado de la homo detruas pli multe ol povas ankoraŭ permesi aŭ jam malhelpi la aktualaj scioj. Solvo de tiu dilemo laŭ-prudente ne povas konsisti el plufarado kaj atendado ĝis la plenkatastrofo [9].

5. Estas fakto, ke ĉiuj religioj, filozofioj, ideologioj kaj politikaj agadkonceptoj posedas nur malmulte da interkonsenta potencialo por la integro de la biosfero. La identoj, kiujn ili liveras al la individuaj kaj organizitaj homoj, estas determinataj per subjektivaj kaj egoismaj, neneŭtralaj en-havoj, kiuj ne taŭgas kiel fundamento por sistemsolvoj, daŭripove protektantaj kaj evoluigantaj la vivan. Ŝajnas eĉ tiel, ke nun post la disfalo de la granda ideologia kon-frontado estas praktikata la detruado de la (ankoraŭ resta) biosfero komune kaj per pacaj, homrajtaj metodoj. La regantaj elitoj ne trovos la povon kaj eblojn deiĝi de siaj pozicioj, detruaj por la tutgloba ekvilibro [10].

6. La koncepto de la noosfera idento de la homo estas modelo por atingi inter-konsenton kaj interkompreniĝon koncerne sistemsolvojn. La homa noosfera idento pri-skribas la saman apartenecon de ĉiu indiv-iduo kaj de la tuta homaro al la pensa terglobo, al la pensa viva materio, transe de ĉia antaŭformulita mondkoncepto. La pensa tavolo de la noosfero disvastiĝadas ekde la terciaro supre de la mondoj de la plantoj kaj bestoj. Ĝi fontas, zoologie rigardate, el totala fortostreĉo de la vivo. Memkonscio, inteligento kiel stokado kaj celkonforma aplikado de scio samkiel ko-lektiva memoro igas la homon la portulo de tiu specifa tavolo. Kiel estaĵo kun racio la homo estas evolucio, konsciiĝinta pri si mem. Siaflanke kreita kaj konservata de la biosfero, *homo sapiens sapiens* nun estas en la pozicio ĝin aŭ konservi aŭ detrui [11, 12, 13, 14].

7. La neŭrobiologio liveras pruvojn, ke la konscia spirito ne estas pasiva korelatajo, sed altnivele direktanta forto, kaŭze efika parto de la cerba proceso. Ĉi-vidpunke la konscio ekutilas, praviĝas koncerne sian ekziston kaj koncerne tion, ke ĝi entute estis evoluinta en la materia mondo. La spiritaj funkcioj kontrolas la neŭrofizio-logiajn elementojn, detale pro siaj pli altaj strukturaj ecoj kaj pro la universala prin-cipo de la influo de la tuto ĉe la deter-minado de la sorto de siaj partoj. La fakto, ke (antaŭe evoluintaj) subjektivaj valoroj havas objektivajn efikojn en la cerbo, submetas tiujn nun kvazaŭ aŭtomate al la sciencoj kiel la plej taŭga bazo, metodo kaj aŭtoritato por determini kriteriojn, kate-goriojn kaj rilatokadrojn pri etikaj valoroj, aksiomoj kaj gvidlinioj aŭ normoj kaj ties prioritatoj, laŭ kiuj la homoj povas vivi kaj regi siajn popolojn kaj sortojn. Al la sciencoj kiel la plej fidinda kaj deviga al-proksimiĝo al la vero estas atribuata la rolo formi niajn valorsistemojn tiel, ke ili pli bone harmonias kun nia hodiaŭa realo kaj oli bone adaptiĝas kaj al la novaj influebloj, pri kiuj la homo nuntempe disponas, kaj al la novaj problemoj, kiujn li/ŝi alfrontas. Pro tio estas postulata etiko surbaze de la natursciencoj, ĉar tie la interkonsenta povo de la homaro estas plej alta [15].

8. Estas evidente pli bone por la socio unue laŭ prioritato ordigi necesojn, bezonojn kaj normojn en valorsistemo kaj agadi kon-forme al tiu ol atendi katastrofojn, kiuj el-devigas la saman ordigon je ekstreme pli altaj kostoj. Koncerne tiun konvinkan kon-sideron la sciencoj, apartenaj al la noosfero, liveras indikojn pri fundamentaj agad-manieroj rilate la traktadon de la naturo, t.e. de la estonteco de la viva kaj per tio ankaŭ de la homo. Ĉi-koncerne memorgan-izado kaj memkonservado estas gravaj rekoniloj de la biosfero. En la noosfero la memorganizado de la pensa viva materio direkte al kaj avantaĝe por si mem devas



fariĝi kolektiva kaj komunikada inteligento por la vivo entute [16].

Kiel baza principo de tiu porviva inteli-gento, kvazaŭ kiel (unu) kvintesenco de la noosfera idento, konsiderendas la principo de prevent(iv)o en siaj kvalita kaj kvanta formoj [17]. La principo baziĝas sur la sci-enca ekkono, ke la vivomondo funkcias pro imanenta, t.e. primara (unuaranga) prevent-ado. Primara preventado signifas evitadon dekomencan de damaĝaj kaj difektaj eblej. Oni priskribas la principon kvalite kaj kvante kiel ekz. en la ekologiaj sciencoj [18] aŭ per la biokibernetikaj reguloj [19], ekz. kiel evito de pozitivaj retroefikoj, aŭ en la senco de minimumigo de entropio kaj de forprenado-de-ne-multe-pli-ol-povas-esti-re-generata en la naturo. Biologia kompetento devigas, alia ekzemplo, al la konstato, ke ekonomie responsanta ekologio kaj eko-logie responsanta ekonomio renkontiĝas en la tezo, ke la naturo ne estu objekto de eks-pluatado, sed estu komprenata kiel decida produkt(iv)a forto de la vivo, konsekvence konservenda [20].

9. Por esti sufiĉe klara aldonendas, ke la noosfera preventiva idento ne egalas al la «respekto kontraŭ la biodiverseco» [21], kvankam tiu aspekto estas kvazaŭ ĝia rekta kaj memkomprenebla elfluo. Ĝi esence estas la bazo de la viva materio, entute, do ankaŭ de ties pensa (=homa) parto. Sen ĝi finfine totala pereo. La aŭtonomia («aŭto-mata») aŭ konscia konformiĝo-adaptiĝo al tiu idento garantias la vivan (t.e. la strukturon kaj dinamikon de ĉio viva), do ankaŭ liberecon, egalecon kaj fratecon.

10. La noosfera idento kiel inteligento por la viva liveras kaj utiligas ilojn, kiuj funk-cias laŭ la principo de primara preventado. Inter tiuj estas ekz. tiom diversaj aferoj kiel la utiligado de neintervenemaj kaj regener-eblaj energioj, la realigado de la Homaj Rajtoj kaj de sociala justeco, la aplikado de laŭeble plej neperfortaj metodoj en la med-icino kaj ĉi-kuntekste la utiligado de inter-nacia lingvo kiel Esperanto.

Esperanto estas imanenta preventilo de la noosfero por la vivo laŭ la du vidpunktoj:

- 1-e kvalita, ĉar ĝi konstruas interetnan, internacian, interkulturan informadon-interkompreniĝadon sur minimumo da egoismoj sen perdo de memidentoj, tiel imanente plenumante la postulon de konkreta (kaj aktiva) neŭtraleco, paco kaj respekto al la Homaj Rajtoj, kaj
- 2-e kvanta, ĉar ĝi reduktas perlingvan informadon-interkompreniĝadon je ĝia esenca minimumo sen perdo de (lingva) kompetento, tiel imanente plenumante la postulon de konkreta (kaj aktiva) materiala ŝparemo (minimumigo de en-tropio) [22, 23].

11. La Internacia Lingvo (Esperanto, Ilo) estas preventilo de la noosfero, ĉar ĝi kom-prenas kaj praktikas kulturon kiel biotopon [17]. La nuntempa agado de la homo devas forlasi la mallumon de nuraj antropocentraj kategorioj kaj anticipi la necesojn de la estonteco. La universala aplikado de la Internacia Lingvo kadre de demokratia du-lingveco modele realigus tiun koncepton.

12. Por doni aktualajn ekzemplojn kon-cerne efektivigon aŭ neefektivigon de la ĵus skizita paradigmo kadre de la Esperanto-movado la jenan:

- 1-e: Kompreneble unuaranga postulo flanke de seriozaj ekolog(ist)oj al la oficialaj Esperanto-organizaĵoj estas eko-logia amendo de ties statutoj cele garan-tion de ekologia (mem)idento. Tiu eko-logia idento fariĝu, apud paco kaj la Homaj Rajtoj, la tria kolono de la propraj fundamentoj. Oni ekz. povus uzi la frazon: «Konsideremo pri la necesoj kaj bezonoj de la biosfero estas integra parto de la propra laboro.» En tiu frazo la nocio «neceso» rilatas al la objektivaj bazaj faktoroj kaj la nocio «bezono» al la laŭcirkonstance modifitaj kaj modifaj kondiĉoj. Enstatutigo de biosfera ade-kvateco de la propra laboro signifas kvazaŭ jure fiksitan kaj fikseblan devon al primara preventado kadre de organiz-aĵaj aktivecoj.

- 2-e: En la oficialaĵoj de la Esperanto-movado kiel ekz. en la deklaracio de la SAT-kongreso 1997 [24] kaj en la Manifesto de Prago de la 96-a kongreso de UEA [25] ĝis nun plene mankas konceptoj pri iu ligado de home neŭtrala internacia lingvo ankaŭ ekologie tiom kompetenta kiel Esperanto kun la esenco de la viva materio. Jen propono koncerne de verdire plej grava kaj absolute necesa 1-a punkto aŭ eĉ preamblo de tiaspeca manifesto. «Noosfero kaj biosfero. La homa specio estas parto kaj partnero en la tuto de la viva kaj malviva materioj. La noosfero kiel sumo el biosfero kaj ĉia homspecia pensado kaj ties rezultoj ampleksas ankaŭ la komunikadon-interkompreniĝon interindividuan kaj intersocian. En la noosfero la memorganizado-memkonservado de la pensa viva materio direkte al kaj avantaĝe por si mem devas fariĝi kolektiva kaj komunikada inteligento por la vivo entute. Esperanto estas neetna 'helplingvo' kaj kiel unu lingvo por ĉiuj imanente neŭtrala kaj materiale maldisipa. Ni asertas, ke la tutmonda komunikado devus okazi laŭ la principo de dekomenca foresto de ĉiaj difektaj ebloj kontraŭ la biosfero. Ni estas movado de unuarange preventiva komunikado-interkompreniĝo.» [26]

13. Ofte estas private kaj publike starigata la demando pri politikaj trajtoj de internacia lingvo kaj aparte de Esperanto kiel ties ĝisdate plej forte evoluinta kaj organizita formo. La nocio de «demokratia dulingveco», kiu kiel rajto de la homo pri neŭtrala lingvo estas ja nur elfluaĵo el la ĝenerale akceptitaj Homaj Rajtoj, evidente estas minimumo de la politika, rilatanta al ĉiu homo, kiu uzas Esperanton, negrave pro kiu individua (plua) celo. Sed pro vere pli forta kialo ILo estas ĝenerala politikaĵo. La nocio de «noosfera prevent(iv)eco» eĉ pli evidente estas minimumo de la politika, rilatanta al la viva materio mem, de kiu la homo kiel portanto de ties pensa parto nur estas frakcio. En tiu senco la aserto, ke «Esperanto estas ne nur lingvo, sed ankaŭ sinteno al la vivo» [27] ĝustas laŭ absolute profunda maniero. Ambaŭ identoj, demokratia dulingveco kaj noosfera preventeco, estas imanentaj al Esperanto, t.e. la centraj neŝanĝeblaj internaĵoj, karakterizaĵoj de la Internacia Lingvo kaj ties parolantoj.

### *Literaturo*

[1] Gudskov, N., **Malneŭtrale pri la neŭtrala**, SAT-Broŝurservo, 1997, ISBN 5-7161-0032-5
[2] Vernadsky. W., **The Biosphere**, 1986, ISBN 0-907791-11-5
[3] Frank, H., **Moralo pri Komunikado**, AIS 1990, ISBN 3-88064-180-3
[4] Krohn, W. i.a., **Selforganisation**, 1990, ISBN 0-7923-0830-1
[5] Günther, W., **Esperanto – Internacia Lingvo por Monda Demokratio kaj Sana Medio**, 1994, EKOMED (aŭtoro)
[6] Guhde, E., **Natur und Gesellschaft**, 1984, ISBN 3-924368-21-X (Esperanta versio: **Naturo kaj Socio**, 1985, ISBN 3-922570-40-2 – Esperanto-Centro Berleno kaj EKOMED)
[7] Ehrlich, P. u.a., **Der lautlose Tod**, 1981, ISBN 3-8105-0507-2
[8] Mayer-Tasch, P. C., **Die verseuchte Landkarte**, 1983, ISBN 3-406-3202-X
[9] Mayer-Tasch, P. C., **Wieviel Katastrophe braucht der Mensch?**, 1987, ISBN 3-407-30052-8
[10] Jonas, H. **Technik, Medizin und Ethik**, 1985, ISBN 3-458-14288-6
[11] Teilhard de Chardin, P., **Der Mensch im Kosmos**, 1959, ISBN 3-406-37445-X
[12] Teilhard de Chardin, P., **Die Zukunft des Menschen (Die Bildung der Noosphäre)**, 1963, ISBN 3-530-87356-8
[13] Snyder, T. P., (ed.), **The Biosphere Catalogue**, 1985, ISBN 0-907791-12-3
[14] Kinzelbach, R., **Ökologie, Naturschutz, Umweltschutz**, 1989, ISBN 3-534-02536-9
[15] Sperry, R., **Naturschutz und Wertentscheidung**, 1985, ISBN 3-492-02937-X



[16] Laszlo, E., **Vision 2020**, 1994 ISBN 2-88124-612-5
[17] Gunther, W., **Preventivo – ĉu ekologia kvintesenco de la vivomondo?**, 1990, vd. 5
[18] Bossel, H., **Umweltwissen**, 1990, ISBN 3-540-53047-9
[19] Vester, F., **Ballungsgebiete in der Krise**, 1983, ISBN 3-423-10080-X
[20] Immler, H., **Vom Wert der Natur**, 1989, ISBN 3-531-12056-5
[21] Schram, J., **Biodiverseco kaj noosfera idento**, *Laŭte* 132, p. 62
[22] *Revuo Esperanto* 1070, 5/1995
[23] Welger, H., **Homaranismo**, 1993, info-servo r.a., Bismarckstr. 28, DE-35037 Marburg, FRG
[24] *Laŭte*, 132, p. 2
[25] *Esperanto*, 1084, 9/1996
[26] *Heroldo*, n-ro 2 (1933), 2/97, p. 2
[27] *LEA/G-Magazino*, n-ro 19 (3/1997), p. 11

*La adreso de la aŭtoro: W. Gunther, Schulstr. 7, DE-34292 Ahnatal, FRG*


# novaĵoj

(pli da *novaĵoj* sur p. 16 kaj p. 24)

## Biskvitfabrik-estro uzas Lingvon Internacian

**Membroj kaj amikoj de la Esperanto-grupo Oberkirch (Baden), inter ili ses LEA/G-anoj, ekskursis al Alsaco lastan majon por kunveni kun lokaj esperantistoj. Kulmino de la vizito estis rigardado de biskvitfabriko. Granda surprizo: La posedanto, sinjoro Wermelinger, parolas flue Esperanton! La kunvenon kronis bankedo, preparita de la Wermelinger-edzino. La Oberkirch-grupkaso subtenis la elspezojn.**

**Kial ne denove al Biscuiterie Wermelinger en F-68530 Buhl (Haut-Rhin), kie oni trovas ĉiun specialaĵon de biskvito, pano kaj aliaj delikataĵoj. (AFS)**




Heinrich Hinze

# La barbareco de la malkatenita monda kapitalismo

**La prognozo estas ĝusta**

de Frank Deppe (ĉerpita el *Neues Deutschland* de 1998 02 24)

La «fantomo de komunismo», kies potencon la eŭropaj potencoj de la restaŭra periodo post la Viena Kongreso timis, ne nur en la revolucio de 1848 alprenis pli konkretan formon. Kun la disvolviĝo de la socialismaj, la komunismaj kaj finfine la kontraŭimperiismaj movadoj en la 20a jarcento ĝi fariĝis la granda defio, la granda kontraŭpotenco al la kapitalismo kaj imperiismo. Ĉiuj ĉi movadoj donis multe da honoro al la *Manifesto* kiel ian «fondan dokumenton» – grandan fonton de inspiro. Hodiaŭ la regantoj ne timas la «fantomon de komunismo» – sed, kiel oni povis legi lastatempe en artikolo de la *Frankfurter Allgemeine Zeitung* – kelkaj timas la «fantomon de la *Komunista Manisfesto*», t.e. la revitaligon de politika debato, kiu metas la hodiaŭan evoluon de la kapitalisma mondsistemo sub la lupeon en la lumo de la kritikaj ekkonoj de la *Manifesto*. Kaj ankaŭ *Die Zeit* (de 1998 02 05) vidas la «fantomon denove hanti»! ...

Antaŭ 50 jaroj – okaze de la 100a datreveno en 1948 – tiuj politikaj fortoj, kiuj sin apogas sur la heredaĵo de la *Manifesto*, apartenis al la plej potencaj politikaj formitaĵoj sur la nacia kiel sur la internacia ebenoj. Fine de la jarcento ni devas ligi la debaton pri la «heredaĵo» de la *Manifesto* kun la doloriga kaj senindulga analizo de la fiasko (aŭ ni diru: la malvenko) de la «grandprojektoj» de socialismo/komunismo en la 20a jarcento...

Tamen, la «funebra laboro» ne fortiru la rigardon de la fakto, ke la sociaj kontraŭdiroj kaj la krizoj – sekve de la tutmonda kapitalisma konkurenco – kun potenco revenas kaj penetras ankaŭ en la ĉiutagan sperton de la homoj. Laŭ indikoj de la Internacia Laboroficejo en Ĝenevo (ILO) ĉ. miliardo da homoj en la mondo – preskaŭ triono de la tuta tergloba potencialo de laborfortoj – estis aŭ senlaboraj aŭ subnivele laborokupitaj, el kiuj 34 milionoj da senlaboruloj en la ŝtatoj de la OEKE-ŝtatoj [OEKE=Organizaĵo por Ekonomia Kunlaboro kaj Evoluo (OECD)]. Por tiuj, kiuj havis laboron, longiĝis la labortempoj, kaj la realaj salajroj estis reduktitaj – la nombro de kronike malsanaj homoj pliiĝas, same la krimado kaj la nombro de malliberigitoj. Kaj la granda sukceshistorio de kapitalismo en la 90aj jaroj – la laborpostena kaj kreskada miraklo de Usono kun oficiala kvoto de senlaboreco de nur kvin procentoj – baziĝas ne sole sur ankoraŭ neniam ekzistinta redukto de la enspezoj de laboristoj dum la pasinta kvarona jarcento, sed sur rapidiĝanta tendenco, ke perditaj laborpostenoj anstataŭiĝas per laboroj kun malpli altaj salajro kaj socialaj atribuoj. Tiu tendenco estus facile konkretigebla por FRG kaj por la evoluo en Okcidenta Eŭropo.

La kapitalo aktuale ne timas la komunismon kaj socialismon. La sindikatoj

*(daŭrigo sur paĝo 21)*



# oferti eblecon partopreni la esperanto-vivon

**de sebastian hartwig**

nevolante malgrandigi la laboron nek la labororezultojn de k-do gary, mi tamen decidis kunmeti kelkajn liniojn kun iom kontraŭa al la de gary impeto.

gary kiel tre demokratiema homo argumentas en sia informilo. lia informilo celas homojn, kiuj jam scias, kio estas e-o, sed kiuj ial kontraŭas ĝin. li provas laŭvice kontraŭargumenti iliajn kontraŭojn. lia informilo strukturiĝas laŭ 5 subpartoj:

**1a**: e-o ja ne estas vera lingvo (75 linioj)

**2a**: vera lingvo evoluas – e-o ne evoluas (52 linioj)

**3a**: en e-o mankas teĥnika vortaro (19 linioj)

**4a**: en e-o ne eblas vortigi ĉiujn nociojn (12 linioj)

**5a**: en e-on ne eblas traduki grandan literaturon (78 linioj)

laŭ la elektitaj de li temoj en lia informilo oni vidas, ke li celas ĉefe al la skeptikuloj, kiuj jam iom scias pri e-o. lia ĉefa temo estas, ke e-o estas lingvo vera, kompleta.

dum lia argumentado li traktas lingvoekzemplojn. ekz-e: por pruvi la evoluon de e-o li asertas, ke zamenhof (kiu estas zamenhof? li ne jam estas priparolita en la informilo!) uzus „paŝo post paŝo," sed la hodiaŭa uzo estas „paŝon post paŝo." li diras, ke la formado de landonomoj per „-ujo" cedas al formado per „-io." ja kiu homo, ne konante esperanton nek ĝiajn internajn diskutojn, pretas sekvi tiun argumentadon? por neesperantisto tiuj detaloj nenion signifas, ŝli ne povas kompreni ilian gravecon aŭ signifon. k plie: ĉu vere interesas la lingvistikaj detaloj de e-o? ĉu ne estas sole grave, ke e-o **funkcias**?

se iu asertas, ke e-o „ne estas vera lingvo," tio apenaŭ estas funde trapripensita. tia reago estas **emocia** sed ne racia. provi konvinki tiun homon per raciaj argumentoj do estas malĝusta taktiko. mi pli ŝatus, se oni ofertus al tiuj homoj eblecojn partopreni la esperanto-**vivon**, tiel ke ili povas **sperti**, ke e-o ne estas teoria „maŝina" sensenta projekto, sed vigla vivanta parolilo, esprimilo, interilo, perilo, rilatilo, do: lingvo. oni pli fokusigu

la funkcion de e-o k malfokusigu la lingvan teoriumadon.

lingvaj detaloj estas gravaj. sed ilia loko **ne** povas esti en baza informilo. pri lingvaj detaloj debatu esperantistoj, neniel neesperantistoj.

la teoriumado pri la lingveco de e-o estas amuza afero k cerba sportado. sed ĝi apenaŭ rilatas al la viva realeco. necesas montri al la publiko, ke e-o – eĉ se ne jam k eble neniam la „monda lingvo" – estas uzata k uzebla jam hodiaŭ, jam nun, jam ĉirkaŭ ili. necesas montri, ke e-o ne estas nur hobio de kelkaj lingvoentuziasmuloj. tio estas klare raŭmisma pozicio – sed ne „silferisma" (termino laŭ georgo kamaĉo).

tiun linion observas ankaŭ gej. ĝia plej energia porpledanto estas „ziko" marcus sikosek. la esencan problemon de la neŭtrala movado, kaj tial ankaŭ de gej, precize vortigis gary en *magazino* 19:

*„La kontraŭpolitikismo kaj politika strutismo, iam fortaj en la ĝenerala movado, cedis laŭ mia impreso multege da tereno. UEA kaj GEA montras klaran tendencon favori la plifortigon de internaciaj institucioj kaj alprenas klaran starpunkton i.a. pri la rasismo kaj la kunvivado de diversaj etnoj en Germanio. Tiuj starpunktoj ne estas ‚neŭtralaj,' sed situas maldekstre de la objektiva politika mezo. Ili estas ĉio alia ol malsimpatiaj. Mi tamen kredas, ke la potenciala rolo de la Esperanto-movado, resp. de Esperanto en la batalo por radikale alia socio estas* ***nia*** *temo.* ***Jen*** *la bariero, kiun supersalti la ĝenerala movado ne emos, almenaŭ ne baldaŭ."*

tiun paŝon la organizo gej ne povas fari, eĉ se ĝiaj membroj ja aliopinias. k tie mi bedaŭrinde denove devas kontraŭi k-don albert. la gdr-aj esperantistoj ne tial „preskaŭ bloke" aliĝis al gea, ĉar ili estas „konservativaj," sed ĉar lea eĉ por tiuj, kiuj scias pri ĝi, ne estas alternativo! gea (kune kun gej) estas la sola aktiva e-o-organizo en germanio, kaj neniu scias, kial ŝli aliĝu al lea. se lea volus, ke homoj okupiĝu pri ĝi k eble eĉ aliĝu, ĝi **devas** diri al la homoj, kial ili faru tion. ĝi **devas** diri, kiuj estas la avantaĝoj ĉe lea k kiuj estas la malavantaĝoj ĉe gea. ĝi **devas** diri: ni bezonas apartan esperanto-organizon, ĉar ... – nu, ankaŭ mi senpacience atendas respondon je tiu demando.

multaj membroj de gej estas „progresemaj," estas politike aktivaj homoj. k ne nur la membroj, eĉ la estraranoj. multaj gej-anoj laboras ankaŭ en aliaj projektoj kun maldekstra politika celaro. k eĉ pli multaj simpatias kun tiaj projektoj. (ekz-e *nelken, pds, bündnis-grüne, spd, fdj, sozialistische jugend, ...*) ili ne tial membras en gea/gej, ĉar ili estas konservativaj, sed ĉar lea ne prezentas alternativon al ili.

en la numero 1/98 de la *magazino* k-do albert skribis pri „preferi agadojn de gej ol tiuj[n] por lea/g." tio estas laŭ mia opinio izoliga k malhelpanta starpunkto. tute ne temas pri preferi agadojn de unu organizo kontraŭ aferojn de alia organizo! mi kunlaboras ĉi tie en berlino kun gej, ĉar lea ĉi tie ne ekzistas! se mi praktike aplikas esperanton, tiam tio okazas dum ijk, is, pentekosta tendaro, kulturaj vesperoj, temaj seminarioj (ekz-e kontraŭrasisma), kef k aliaj. mi do aŭtomate devas kunlabori kun gej, se mi iel volas aktive uzi esperanton.

sed aliflanke tiu kunlaboro **tute ne estas kontraŭ lea!** kontraŭe! ĉar la gej-anoj plejparte estas politike aktivaj homoj, ĉar ili plejparte simpatias kun socie progresivaj projektoj, ĉar ili ĝuste **ne** estas konservativaj, tial eblas realigi kun ili ankaŭ progresivajn projektojn! unu ekzemplo estas la kontraŭrasismaj seminarioj, kiujn organizas gej/ejb. tiuj kongruas (laŭ mia kompreno) kun la celaro de lea, tie ĝi povas kunlabori. lea devas kompreni, ke jen troviĝas la materialo, kiun ĝi devas uzi; ke jen troviĝas homoj kun sama celaro kiel de lea; ke jen ĝi devas **aktive kunlabori!** k ĝuste tiel mi ankaŭ imagas informan strategion de lea. ekzemplan realigon de tiu ĝenerala strategio mi donas per la sekva projekto de informilo, kiun eldonu k publike distribuu k gej k lea.

oni observu, ke ne jam ekzistas la menciitaj en la informilo interretaj adresoj de lea, k ke gej ĝis nun neniel ajn jesis al tia kunlaborado, eĉ ne scias pri ĝi. la sekvan informilon mi skizis celante al festo de ig medien en brandenburgio/berlino, kiu okazos en septembro k celas esti manifestacio kontraŭ naciismo, faŝismo k rasismo, ĉefe celante junularon. tie lea k gej povus komune organizi informstandon.

oni ankaŭ rimarkos, ke mi celas alian informilon ol gary. por mi ne gravas argumentado pri lingvistikaj detaloj, sed montri la jaman enuzon de e-o. certe ambaŭ specoj de informilo havas valoron en sia kampo.

mia skiza informilo havas du flankojn. la malantaŭan flankon oni povas eble adapti al alia temo. aŭ oni povas produkti la aferon kiel glumarkon; tiuokaze ĝi tute ne havus dorsan flankon. mi konceptis ĝin kiel malmultekostan kartonslipeton, kiun oni povas

amase disdoni aŭ eĉ meti stoke en publikajn lokojn, ekz-e universitatajn manĝejojn. la koloro estu malhelblua, k la slipetoj presiĝu profesie, ne kopiiĝu.

**ESPERANTO**

die *internationale* Sprache

www.esperanto.de

*Esperanto: Internationale Gemeinschaft erleben.*

*Z. B. auf der Internacia Semajno: ein Jugendtreffen mit ca. 300 Teilnehmern aus fast 30 Ländern, jedes Jahr über Silvester. Das ist eine Woche: Musik, Freunde, Durchfeiern, Diskussion, Spaß, Sport, Workshops in Esperanto.*

*Deutsche Esperanto-Jugend*
*Grellstr. 36*
*D-10409 Berlin*
*gej@esperanto.de*

*Freier Esperanto-Bund*
*Renchener Str. 47*
*D-77701 Oberkirch*
*lea@esperanto.de*



# La „uloj“ en Esperantio

Honton al tiu,
kiu malice pensas pri tio.

Esperantio estas la plej granda el ĉiuj landoj; ĉar ĝi etendas sin sur la tutan teron. Ĝiaj enloĝantoj, la Esperantistoj aŭ Esperantanoj, apartenas preskaŭ al ĉiuj rasoj; tamen ili havas la saman volon, la saman celon. Pro tio ili nomas sin gefratoj. Sed kiel en la ĉiutaga vivo la fratoj kaj fratinoj havas malsamajn emojn kaj karakterojn, tiel estas ankaŭ en Esperantio. Iom post iom estiĝis kaj estiĝas apartaj tipoj, kiuj estas troveblaj ĉie, kie loĝas Esperantanoj. Tiaj tipoj estas la **„uloj“** en Esperantio.

La ***eminentuloj*** naĝas kiel „grasokuloj“ sur la Esperanta buljono. Sed bedaŭrinde nur malofte ili estas videblaj. Ili sidas sur sia alta trono, de sur kiu ili, anstataŭante nian karan Majstron, regas serioze pri la tuta Esperantistaro. Se ili estas vokataj, ili aperas kun granda sekvantaro (ne elektita, sed altrudinta sin al ili), parolas kun rokfirma konvinko kaj orakolas pri la fina venko de nia sankta afero. Ni ekgenuu kaj preĝu al la ĉiupova Dio: „Ŝirmu niajn eminentulojn, la steloj sur la Esperanta ĉielo!“

La ***laboremuloj*** kaj ***agemuloj*** estas la granda multo de tiuj Esperantistoj, kiuj efikas kiel estroj, sekretarioj, kasistoj ktp. en la grupoj kaj gruparoj. Neniu povas pretendi, ke ili estas enviindaj homoj. Ili brilas pro fiero kaj ĝojo, se oni gloras ilin kaj aplaŭdas pro iliaj faroj. Sed se mankas gloro kaj aplaŭdo, ili forlasas sian pozicion kaj koleretas en iu kaŝa angulo de Esperantio, ĝis kiam oni alvokos ilin al nova gloro. Ni ne forgesu apartan kategorion de la laboremuloj, nome tiujn, kiuj kviete kaj diligente instruas en kursoj. Pri ili neniu parolas; oni nur konstatas, kun kiom da lernantoj ilia kurso komenciĝis kaj kun kiom da restantoj ĝi finiĝis. Tamen ili estas kontentaj; ili estas la veraj ***modestuloj*** kaj estas necesaj por Esperanto kiel la ĉiutaga pano por ĉiu homo.

La ***propagandemuloj*** estas ankaŭ tre necesaj por nia movado, sed ofte tre danĝeraj por la aliaj civitanoj de la mondo. Ofte ili ĵetegas sin kun alten tenita verda stelo kiel krabroj sur sian viktimon, prilaboras kaj turmentas ĝin, ĝis kiam ĉi tiu krias: „Neniam mi lernos Esperanton!“

Jam tre grandnombra estas la kategorio de la ***logikemuloj, kritikemuloj*** kaj ***harfendemuloj***. Domaĝe, ke Esperanto jam estis elpensita, kiam ili naskiĝis. Se ili estus kreintaj nian lingvon, jam la suĉinfano en la lulilo povus paroli ĝin. Eĉ la plej saĝa lingvisto estus devigata, renversi sian tutan logikon por kompreni la lingvon de la ĵus nomitaj uloj. Antaŭ ili Zamenhof estas mizera noktkandelo. Ido neniam estus estiĝinta. Ĉie, kie ili aperas, ekestas la plej vigla vivo: Ĉiu ekprenas siajn librojn, sian ĉapelon kaj mantelon kaj forlasas la lokon de la teruro. Se ili, la uloj, estas solaj, komenciĝas kruela laboro. Nia kara lingvo kuŝa kiel nuda virino sur la tablo kaj mortas sub la senkompata tranĉilo de la

disputantoj. Baldaŭ la kadavro ne plu estas videbla pro la amso da pensosplitaj kaj fenditaj haroj, kiuj kovras ĝin. Se ĉi tiuj uloj ekvidas Esperantan tekston, ili tuj elpoŝigas grandan mikroskopon kaj esploras vorton post vorto, por trovi la plej malgrandan tekston, je kiu ili povas alkroĉi siajn emojn. La kritik-, logik- kaj harfendemuloj estas la ezokoj en la karpolageto. Ni ĉiutage preĝu: „Dio savu nin de la malbono!"

Ofte identaj al la lasta nomitaj uloj estas la ***reformemuloj***. Se ili ne sukcesas altrudi al la Esperantistaro siajn reformproponojn, ili transiras al la Idistoj: Bonan vojaĝon! Fartu bone!

Mi preskaŭ estus forgesinta la ***grupfondemulojn***; sed ĉar ĉiu Esperantisto sufiĉe bone konas ĉi tiun kategorion, mi aparte ne karakterizos ĝin.

Kiu konas pliajn „ulojn" en Esperantio?

*Modestulo*

Mi ne scias, kiu estis tiu Modestulo. Sed mi scias, ke li skribis la artikolon en la jaro 1923. Ĉu ne la vivo en Esperantio hodiaŭ estas la sama kiel antaŭ 75 jaroj?

K.H. Kersting

---

# novaĵoj

(pli da *novaĵoj* sur p. 9 kaj p. 24)

## Pacifista movado aliĝis al S.A.T.

**TUTMONDE – Pacifista Movado por esperantistoj – fondita en 1985 en Terrassa/Hispanio, decidis subteni S.A.T. ĉe aktivecoj por la paco. Ĝi aliĝis kiel grupo ek de la 1a de januaro 1998. Ĝi eldonas folieton, *Kune*.**

**Post reorganizo la TUTMONDE-anaro nombras pli ol cent membroj. Multaj el ili estas samtempe S.A.T.-membroj.**

**TUTMONDE subtenos la frakcion de pacistoj de S.A.T., kies parolanto estas nuntempe J. Lépeix, Strasburgo. (AFS)**

## 1a de majo en Berlino

**Ankaŭ ĉi-jare kvar membroj de la Maldekstra Forumo malvolvis ĉe la centra manifestacio de la Germana Ligo de Sindikatoj sloganbendon kaj disdonis plurajn centojn da flugfolioj.**

**Agrabla surprizo estis renkonti esperantiston el Parizo, kiu preterpasis. (GM)**

## E-liberecanaj Renkontiĝoj en la «Laŭtejo»

**En la «Laŭtejo» (FR-47470 Beauville, sidejo de *Laŭte* kaj la SAT-Broŝurservo) okazos meze de julio kaj de la 15a ĝis la 19a de aŭgusto – la datoj estas tamen «elastaj» en tiu senco, ke eblas etendi la restadon antaŭe aŭ poste – renkontiĝoj de Esperantistoj-liberecanoj, kiuj pritraktos i.a. la rilatojn inter Esperanto kaj anarkiismo, bilancon kaj perspektivojn por la Liberecana Frakcio de SAT, LERT, k.a., rilatojn kun neesperantistaj liberecanaj organizoj, rilatojn kun aliaj progresemaj tendencoj en Esperantio, eldonadon kaj reeldonon de liberecanaj tekstoj en Esperanto (ampleksa *Anarkiisma Kompendio* estas jam preparata), la ekonomion en libereca socialismo. Eblas proponi pliajn temojn. Informas:**
**C. Baudé, FR-47470 Beauville (*Laŭte* 1998 05 kaj 1998 07)**



***K.R.Ä.T.Z.Ä. (Dunckerstr. 11, D-10437 Berlin / kraetzae@kraetzae.berlinet.de) estas berlina grupo, kiu okupiĝas pri infanaj rajtoj. Atentindaj estas iliaj argumentoj i.a. por la enkonduko de la infana balotrajto. Mi ne scias, kiom da legantoj retenas kiel mi pri sia infanaĝo, resp. pri sia ankoraŭ-ne-plenaĝeco, viglan memoron pri la sento de diskriminateco kaŭzita de tio, ke iliajn opiniojn pliaĝuloj ne prenis serioze – pro iliaj laŭdiraj nescieco, manko de sperto ktp. Tiuj legantoj certe ne traktos la infanan balotrajton kiel frivolaĵon. Kiu volas supervenki la hierarkie ordigitan sociordon de neegala potencdistribuo ne povas ne preni ankaŭ la aĝdiskriminacion en konsideron. La unuaj du dokumentoj redonitaj ĉi-sube estas dokumentoj de K.R.Ä.T.Z.Ä., kiujn ĝi mem faris en Esperanto (kaj aliaj lingvoj) kaj disponigas al la publiko per la Interreto (http://privat.schlund.de/kraetzae/). Ĉe la lasta temas pri eltiraĵoj el germanlingva dokumento de K.R.Ä.T.Z.Ä., tradukitaj de mi. (GM)***

**Kverelantoj pro infanoj rajtoj**

# *Interretaj paĝoj de K.R.Ä.T.Z.Ä.*

K.R.Ä.T.Z.Ä.

***(enhavo de kiuj_ni.htm)***
**K i n d e r R Ä c h T s Z Ä n k e r**

Ni estas grupo de infanrajte aktivaj junaj (neadoltaj) homoj, kiuj engaĝiĝas pri fundamentaj ŝanĝoj de la socio.

Ni posemajne multfoje renkontiĝas kaj estas tre diversspecaj homoj. Ni ĝojiĝas pri poŝto (kaj pri donacoj).

Ni estas ĉirkaŭ 20 personoj inter 13 kaj 18 jaraĝaj (ekzistas iuj ekceptoj).

Ekde marto de 1996 ni estas en la TTT kaj ni ĉiutempe plibonigas niajn informaĵojn.

Ni atingeblas
poŝte: KRÄTZÄ, Dunckerstr. 11, D-10437 Berlino, Germanio
telefone: +49 30 4479722
fakse: +49 30 4479720
retpoŝte: kraetzae@kraetzae.berlinet.de
Ĉi tiu paĝo ne ekzistus sen Schlund & Partner.

***(enhavo de homeespe.htm)***
**K i n d e r R Ä c h T s Z Ä n k e r**
(= Kverelantoj pro Infanaj Rajtoj)

***Kiuj ni estas***

*La Kverelantoj pro Infanaj Rajtoj estas porparolantoj de samrajtigo por malpli ol 18-jaraĝaj homoj*

Kelkaj tekstoj disponeblas ankaŭ en germana, hispana kaj angla lingvoj.

Ĝis nun okazis agadoj, kiuj rilatis al la ĉi-sekvaj punktoj (vidu ankaŭ nian reprilaboritan kronikon laŭ la stato de 1998-02):

- KinderRÄCHTzwiebel – aboco de infanaj rajtoj
- Kion ni trovas malĝusta je la lernejo
- Balotrajto sen aĝlimo - reklamacio pro nekonstitucieco
- Ofte prezentataj demandoj
- Jura pravigo de nia reklamacio pro nekonstitucieco
- Citaĵo de Ekkehard von Braunmühl - advokato de infanaj rajtoj
- Elstaraj subtenantoj – listo de subtenantoj

- Federacia Konstitucia Kortumo ne akceptas la reklamacion – gazetara komunikaĵo
- K.R.Ä.T.Z.Ä. ĉe vicprezidantino de la Federacia Parlamento Antje Vollmer en Bonn (gazetara komunikaĵo)
- korespondado inter K.R.Ä.T.Z.Ä. kaj Antje Vollmer

- Balotrajto – dua etapo
- Oficiala peto pri enregistriĝo en la listo de balotantoj
- Rajto je kleriĝo anstataŭ lerneja devigo – aŭ: Kritika lernejano eljetita – Ampleksa dokumentaĵo
- Pri infana laboro
- Veturo al Nikaragvo somere de 1996 rilata al la temo de infana laboro
- Dulingva gazeto (produktita en Nikaragvo)
- Seminario pri infanaj rajtoj en Estelí - konkluda deklaro
- Broŝuro de dokumentado

**Laborantaj infanoj kaj gejunuloj gastis en Berlino (1997 julio)**

- Kongreso pri infanaj rjatoj (gazetara komunikaĵo)
- Hejmpaĝo de MOVIMIENTO INFANTIL (NATRAS)
- Dulingva eldono de la "KinderRächts-Zeitung Regenbogen" ("ĵurnalo de infanaj rajtoj Ĉielarko")
- La 12 personaj rajtoj
- Helpo por infanedukantaj gepatroj - eldiroj
- KinderRächtsZeitung REGENBOGEN ("ĵurnalo de infanaj rajtoj Ĉielarko") ĉi tie en Interreto - jam de 1997-03-07

(Ĉi tie sekvas denove la adresoj.)

*(kelkaj eltirajoj el 2wfrag.htm [versio de 1998 04] tradukitaj de GM)*

## Ofte prezentataj demandoj kaj la respondoj de la Kverelantoj pro infanaj rajtoj (K.R.Ä.T.Z.Ä.-anoj)

***Kial vi reklamaciis pro via balotrajto?***

Unue, ni postulas nian balotrajton, ĉar ni opinias, ke ĉiu rajtas povi kundecidi. Ĉiuj homoj koncernitaj de decidoj devas havi okazon kundecidi. Homoj malpli ol 18-jaraj ĝis hodiaŭ ne havas tiun eblon.

Tial ni opinias ankaŭ, ke la interesoj de infanoj estas nur nesufiĉe konsiderataj en la parlamento.

Dua grava punkto estas nia intereso diskuti la temon «Balotrajto – kial nur ekde 18-jareco?» publike. Kiam oni fine ekparolos pri tio, klariĝus ankaŭ, ke oni ne prenas infanojn vere serioze. Temas do ankaŭ pri niaj bazaj rajtoj, kaj ne nur pri la baza rajto je kundecidado. Nia subtenanto-listo montras, ke ankaŭ elstaraj personuloj subtenas nian aferon.

***Ekde kiu aĝo oni rajtu baloti?***

La postulo en nia grupo por infanaj rajtoj K.R.Ä.T.Z.Ä. estas balotrajto sen aĝa limigo. Tio signifas: Ĉiu, kiu volas, rajtu baloti. Same kiel ne ekzistas leĝa diskriminado surbaze de la haŭtkoloro, sekso, religio aŭ pro handikapoj, ankaŭ pro aĝo ne ekzistu tia.

Demokratio signifas, ke neniu estas ekskludata: unu homo – unu voĉo. Pro tio estas fiksita en la leĝo la «ĝeneraleco» de la elektoj.

***Ĉu ankaŭ beboj iru al la balotejo? Tio ja ne eblus.***

Ĉiam denove oni alparolas nin pri tiu punkto, kelkfoje moke. Kredeble la plimulto de malgrandaj infanoj ne iros voĉdoni. Temas pri rajto kaj ne devigo. Kaj ankaŭ la nekapablo de homo partopreni la elektojn ne devus – senkonsidere pri ties aĝo – konduki al tio, ke oni krome forprenas de li la rajton je tio. Difini novan aĝlimon ekzemple ĉe 5-jareco ne povus esti pravigita principe kaj restus nedemokratia, eĉ se ekzistus iuj gepatroj, kiuj per iaj artifikoj eluzas la voĉon de sia bebo. Laŭ la sama maniero ankaŭ nun okazas de tempo al tempo ĉe maljunaj homoj, ke iu alia faras por ili la kruceton – kvankam tio estas strikte malpermesita.

Ni opinias, ke per la demando pri la beboj oni deturnas la atenton de nia baza homrajta ideo.

***Kial la reklamacio ne estis allasita je formala proceso?***

Konstituciaj reklamacioj kontraŭ «leĝo aŭ alia ago de la suverena potenco» devas esti venigitaj al la kortumo ene de unu jaro post konatiĝo de la precizaj stipuloj de la leĝo. Benjamin kaj Rainer devintus do reklamacii jam longe antaŭ sia naskiĝo. Ke tio ne eblas, estas klare. Sed evidente tio egalas al la konstituciaj juĝistoj. Nia advokato pridubas la ĝustecon de tiu decido, ĉar laŭ art. 19(4) de la konstitucio la vojo de jura procesado devas esti malferma al ĉiu, kies rajtoj estas atencitaj.

Oni tamen ne kontraŭstarigis al la enhavoj de nia postulo ion ajn.

***Kion vi nun faras por atingi vian balotrajton?***

La 12an de februaro 1998 la kverelanto pro infanaj rajtoj Robert Rostoski (16-jara) formale reklamaciis kontraŭ la distrikta oficejo de Mitte, kiu ne enskribis lin en la registro de balotantoj okaze de la parlamentaj elektoj. Laŭbezone ni trairos ĉiujn instancojn, ĝis ni denove alvenos al la Federacia Konstitucia Kortumo. Ni ĉirkaŭiras per tiu procedo la templimon de unu jaro. Tiam la kortumo estos devigita rilatigi sin al nia postulo enhave.

***Ĉu vi kredas, ke gejunuloj sufiĉe intime konas la politikon por scii, por kio ili voĉdonas?***

Kion efektive signifas «koni intime la politikon»? Voĉdoni signifas ja: mi elektas iun, kiu plej bone reprezentas miajn interesojn.

Kaj la stilo de la politiko kredeble ŝanĝiĝus okaze de ŝanĝo de la pribalota juro. Infana balotrajto signifas nome por la plenkreskuloj transformi sian pensadon: politikistoj devas vere peni kaj tiel verki siajn balotprogramojn kaj antaŭelektajn paroladojn, ke infanoj povu kompreni ilin.

Cetere, ankaŭ multe da plenkreskuloj neniel intime konas la politikon, sen ke oni pro tio malatribuus al ili la balotrajton. Kiu volus entute difini, kio estas la esenco de politika prijuĝkapablo? Eĉ se ekzistus testo pri politika juĝkapablo, ĝi ne kondukus al rigidaj aĝlimoj.

***Ĉu vi ne opinias, ke infanoj estas multe tro facile influeblaj?***

Ĉiuj homoj konstante influas sin reciproke. Kaj en tiu senco gravas, ke infanoj kaj ĉiuj aliaj homoj estas influeblaj, ĉar alie elektoj, aŭ almenaŭ balotkampanjoj, estus plene superfluaj.

Kompreneble ekzistas la danĝero, ke oni estas intence false informita. Ankaŭ al maljunaj homoj, eble jam seniliĝintaj, tio povas facile okazi; oni tamen ne forprenas de ili la balotrajton pro tio. Verŝajne infanoj eĉ estas mezume pli altgrade influeblaj kaj pli facile manipuleblaj ol plenkreskuloj. Tio rezultas i.a.

de tio, ke multaj antaŭe faris tre malmulte da politika pensado. Kial ja? Ili ĝis nun ne havis kialon por tio, ĉar oni ĉiukaze ne pridemandis ilin.

En ĉiu kazo la partioj ne tiel facile sukcesos pli mensogi al infanoj ol al plenkreskuloj, ĉar tiujn mensogojn la kontraŭpartio senvualigas, kaj per tio rezultas perdo de voĉoj por la mensogula partio. En tiu kunteksto ĉiam revenas en nian kapon la fabelo pri la «novaj vestaĵoj de la imperiestro», en kiu devis unue veni infano por fini la tutan mensogecon. La plenkreskuloj kun sia tuta vivsperto lasis sin «influi» de la mensogulo...

En la kazo de bezono oni devus reguli la balotkampanjon anstataŭ forpreni de infanoj la balotrajton.

***Per elektoj ĉiukaze nenio ŝanĝiĝas – oni ofte diras.***

Unue, eĉ tio ne estus kial por ekskludi infanojn. Kaj due, ni premisas, ke la partiaj programoj ŝanĝiĝus favore al la infanoj, eĉ ĉe konstanta procenta proporcieco de la diveraj partioj.

***Kial vi ne faras agadojn rilate al la balotrajto por eksterlandanoj?***

Kompreneble, ni estus la lastaj, kiuj protestus kontraŭ balotrajto de eksterlandanoj. La balotrajto por la negermanoj, kiuj havas la mezan punkton de sia vivo ĉi tie, devus esti fakte memkomprenebla en demokratio, same kiel la infana balotrajto. Sed ekzistas interesorganizaĵoj, kiuj okupiĝas pri tio, kaj ni por la komenco proparolas niajn rajtojn.

***Kiumaniere vi trafis al la temo balotrajto?***

De 1992 ni de K.R.Ä.T.Z.Ä. kunestas kiel grupo, kaj ni jam faris diversajn agadojn kaj eldonis diversajn materialojn. Ekzemple la afiŝo «Kion ni trovas malĝusta je la lernejo», la aboco de infanaj rajtoj *KinderRÄCHTzwiebel* aŭ la balotprogramo de la moskitoj en la teatraĵo de la GRIPS-teatro *Die Moskitos sind da!* [«Alvenis la moskitoj!»]. Ĉiam temis pri principaj rajtoj por infanoj. Ĉie ni devas akiri la sperton, ke ni havas malmulte da ebloj kundecidi. Krome, ni estis ĉe ĉiaj imageblaj aranĝoj kiel la infanaj pintkonferencoj aŭ infanaj parlamentoj. Ĝuste tiuj aranĝoj estis ofte alibio por iu politikisto; veraj ŝanĝoj aŭ efektiva kundecida rajto ne ekzistis. La lernejon ekzemple ni ne povas ŝanĝi per afiŝo, lernejana konsilio aŭ eĉ per infanaj parlamentoj, sed nur, kiam ni vere povos baloti pri tiuj aferoj.

**6a Internacia Esperanto-Semajno de la Kulturo kaj Turismo**

Ĉi tiu aranĝo, sub la aŭspicioj de Hispana Esperanto-Muzeo, okazos de la 3a ĝis la 10a de oktobro 1998, en la urbo Calafell de la provinco Tarragona (Katalunio-Hispanio). Pliajn informojn vi povas peti de Hispana Fervojista Esperantista Asocio, Apartado 15027, Barcelona (Hispanio), telefono: (93) 727 5021, rete: jserrano@Doc6.es

La «Semajno» inkluzivos kursojn diversnivelajn, prelegojn kaj kolokvojn, krome abundajn ekskursojn. Ĝi okazos en komforta hotelo 50 metrojn for de la strando de Calafell.

***(Deppe: La barbareco de la malkatenita monda kapitalismo: daŭrigo de p. 10)***

estas ekstreme malfortiĝintaj en la plimulto de landoj, kaj antaŭ ĉio en FRG la domina plimulto de sindikatoj de la Germana Sindikata Ligo profiliĝas per subalterna sinadapta konduto, per kasteca,



socipartnerisma politiko (de «mikrokorporaciismo» sur la entreprena nivelo) por «laborista aristokratio», dum kio estis forrezignita pli kaj pli la «politika mandato» reprezenti la interesojn de la tuta laborista klaso – ankaŭ de ties plej diskriminataj partoj. Tio estas unu tendenco, kiu plej tendencas generi pesimismon.

Ekzistas tamen ankaŭ alia tendenco, tiu de la kreskanta rezisto kaj la pliiĝanta batalpreteco kontraŭ la altrudaĵoj, ĉantaĝoj kaj katastrofoj, kiujn la hodiaŭa kapitalismo kaj la politiko de la novliberalismo produktas. Ekde la mezo de la 90aj jaroj ekzistas tutmonda ondo de strikoj, amasaj manifestacioj kaj rezistaj agadoj – ne nur en Francio, sed ankaŭ en Norda kaj Suda Ameriko kaj en multnombraj aliaj partoj de la mondo... Dum ĉi tiuj tagoj oni raportas pri amasaj manifestacioj kaj elpredado de superbazaroj en Indonezio, t.e. formo de klasbatalo, kiu prezentas unuflanke reagon al la saltanta kresko de la senlaboreco kaj la malriĉeco sekve de la orientazia krizo, kaj kiu aliflanke alprenas senpere politikan karakteron pro la politika diktaturo en tiuj landoj (konforma al la intereso de la nacia kaj internacia kapitalo).

Tio estas nur kelkaj ekzemploj; la analizo povus esti daŭrigita. Ĝi kondukas al la konkludo, ke ni proksimume ekde 1995 atestas novan ondon de sociaj konfliktoj kaj klasaj interkontestadoj kun terglobaj dimensioj, kiuj siaflanke plej proksime ligiĝas al la kontraŭdiroj, kiujn la transnacia kapitalismo kaj la novliberala politiko estigas. Tion akompanas ankaŭ fortiĝanta klasa konscio. Leo Panitch, kanada marksisto kaj socialisto, en sia kontribuo okaze de la 150a datreveno de la *Manifesto* en la *Socialist Register* citis la britan (kapital-)gazeton *Economist*: «Multaj komentistoj opinias, ke la klasoj mortas, sed simplaj homoj ne estas konvinkitaj pri tio. Klasaj antagonismoj povus eĉ pliiĝi – laŭ Gallup la proporcio de balotantoj, kiuj kredas je tio, ke ekzistas klasbatalo, kreskis de ĉ. 60% en la fruaj 60aj jaroj al 81% meze de la 90aj jaroj... Eĉ en Usono enketo de la *New York Times* malkovris en 1996, ke intertempe 55% de la usonanoj difinas sin kiel anojn de la laborista klaso, dum nur 36% atribuas sin al la meza klaso – ekstreme signifa inversigo de tradicia usona pensmodelo...»

Iĝis malfacile fari konkludojn. Tamen, la prognozo de la *Manifesto*, ke la malkatenita monda kapitalismo produktas barbarecon, pruviĝas ĝusta. Same ĝuste estas, ke el tio estiĝas sociaj kaj politikaj konfliktoj, formoj de kolektiva agado de la subalternuloj kaj subpremitoj en tutmonda skalo. Tio sendube apartenas al la spertoj de la dua duono de la 90aj jaroj.

*Prof. Deppe instruas politikologion ĉe la Universitato de Marburg. Lian kompletan referaĵon faritan 1998 02 14 ĉe la* Manifesto-*konferenco de Wuppertal publikigas kajero 3 de* Sozialismus.

---

**Nekrologoj**

**Kun bedaŭro ni eksciis pri la morto de**

**Josef HOFFMANN**

**Nia amiko Josef aliĝis al nia asocio jam en 1959. Li estis ĉiam aktiva kaj kunagadis ankaŭ en la redakcio de nia siatempa organo *La Libera Esperantisto*. Li estis ĉiam fidela membro.**

Ni perdis amikon. Mortis

## Rolando GRANDIÈRE

**Rolando en ĉiu tempo zorgis pri amikaj kontaktoj inter SAT-Amikaro kaj LEA/G. Ni estas afliktitaj, ke ni perdis unu el la geamikoj en Francio.**

**Ni esprimas nian kondolencon al Lilio, edzino de Rolando; preskaŭ ne imagebla, ke ni estonte ne plu povos saluti ilin kune dum kunvenoj, kongresoj.**

**Rolando trovis lokon en la analoj de nia germana LEA.**

***Por la Estraro:***
***A. F. Stephan / Gary Mickle***



**La laborista esperantismo perdis eminentan aktivulon. Mortis en Mettmann (Germanio) la 16an de majo ĉi-jare nia fidela kamarado**

## Alfred CONZETH

**en la aĝo de 85 jaroj. Alfred en ĉiu tempo multjare subtenis aktivecojn ne nur de Libera Esperanto-Asocio, sed ankaŭ de la loka grupo, Esperanto-Societo Düsseldorf, kie li i.a. eldonis la bultenon *La Radsaltanto.* Li verkis Esperantlingve broŝurojn ekz. pri la mondhorloĝo, Esperanto-teatro ktp. Multaj tekstoj kaj artikoloj devenas el lia plumo. Ni ne forgesu mencii, ke Alfred krom tio estis eminenta SAT-membro.**

**Ni kondolencas al la vidvino Helga, ankaŭ tre aktiva esperantistino. Ni ne forgesos Alfred.**

**Oberkirch/Düsseldorf, en majo 1998**

| | |
|---|---|
| **Albert F. Stephan (por Libera Esperanto Asocio)** | **Hans Meyer (por Esperanto-Societo Düsseldorf)** |

**Ni kondolencas al la familianoj.**


**Laŭ informo de la filo mortis en Hinte (Germanio) nia fidela membro**

## Helmut KOHLE

**Li apartenis al la asocio jam multajn jarojn. Ni kondolencas al la familianoj.**



**anonco**



KIOM DA BANANOJ EBLAS EN AVIO?

Tutmondiĝo 2000 -
pri la paca konsumo de l'onto.

**libera komunikado kiel artaĵo**
horizontala demokratio
kolektiva kreivo
nekomerca agado
**POŜTARTO - MAILART**
Kombinado de poŝte ekspedebla
artaĵo (du- aŭ tri-dimensia)
kun la poŝta porekspeda prilaborado (poŝtmarkoj, stampoj ktp.) -
unu el la plej bazdemokratiaj
ebloj publike formuliĝi.

---

**Invito**
partopreni en la

**POŜTARTA EKSPOZICIO**
okaze de la 84-a Universala Kongreso de Esperanto
Berlino, 1999

---

Ĉiu, kompreneble kaj aparte **ankaŭ infanoj**
rajtas kontribui po unu artaĵon,
datigitan kaj subskribitan
(kune kun slipo enhavanta bazajn informojn
pri la artaĵo kaj la artisto).

Artikoloj pri la temo estas bonvenaj.

La kontribuaĵoj fariĝas posedaĵo de la organizanto.
Estos katalogo.

Limdato: La artaĵoj devas atingi la organizanton
plej malfrue la 31-an de marto 1999.

---

Organizanto

**NULA HORO**
(Internacia artgrupo
kun Esperanto kiel komuna lingvo)
Lupiro el Anavalo (Don Mail)
Schulstr. 7, DE-34292 Ahnatal, FRG

*Anoncetoj*

Ĉu vi uzas dBASE aŭ alian xBASE-aplikajon kaj serĉas rimedojn por krei datumbankon kun Esperantlingva materialo? Se jes, precipe se vi volas teni, aŭ jam tenas en tia datumbanko leksikografian materialon, mi povas provizi kelkajn programojn kaj ellaborajojn, kiuj eble utilus al vi. Mi ŝatus interŝanĝi spertojn kaj programojn kun aliaj, kiuj jam okupiĝas pri io simila. *G. Mickle, Brüsseler Str. 6, D-13353 Berlin.*

Kelkaj berlinanoj okupiĝas pri modifado de TrueType-tiparoj por Vindozo, altaŭgigante ilin por Esperanto per aldono de la supersignitaj literoj (laŭ Latin-3 / ISO 8859-3). Temas grandparte pri ornamaj fasonoj. Vi povas ricevi diskedon kun tiaj tiparoj kontraŭ pm. en valoro de DM 3 (se vi loĝas ekster Germanio, eble sendu broŝuron, gazeton aŭ alian rekompenceton). *G. Mickle, Brüsseler Str. 6, D-13353 Berlin.*

# novaĵoj

(pli da *novaĵoj* sur p. 9 kaj p. 16)

## Esperanto-Asocio de Humanistoj fondita

**Ĉi tiu nova asocio eldonis inter februaro kaj aprilo jam tri numerojn de sia organo *La Humanisto*, kiu traktas i.a. temojn kiel «Apologio de Humanismo», «Religio – necesa? dezirinda?» kaj «Elstare konataj humanistoj». *Adreso*: Esperanto-Asocio de Humanistoj, W. H. Simcock, Clayton House, Butterton, Leek, Staffs, Britio, ST3 7SR. *Retadreso*: whsimcock@compuserve.com (el: *La Verda Proleto* 1998 04)**

## Enhavo:

| | paĝo |
|---|---|
| **Junaj homoj al la «Fronto» (Albert Stephan)** | 1 |
| **Eblas atingi la redakcion retpoŝte!** | 2 |
| **Anonctarifo** | 2 |
| **Solidareco (Albert Stephan)** | 3 |
| **Paco kaj libereco en Kosovo (H. Alos i Font / KEA)** | 3 |
| **La Internacia Lingvo (Esperanto, Ilo) kiel preventilo de la noosfero (Wolfgang Gunther)** | 5 |
| **NOVAĴOJ** | 9 |
| **La barbareco de la malkatenita monda kapitalismo (Frank Deppe)** | 10 |
| **Informila sekcio: *oferti eblecon partopreni la esperanto-vivon* (Sebastian Hartwig)** | 11 |
| **La «uloj» en Esperantio (Modestulo)** | 15 |
| **NOVAĴOJ** | 16 |
| **Interretaj paĝoj de (la kverelantoj pro infanaj rajtoj) K.R.Ä.T.Z.Ä.** | 17 |
| **NEKROLOGOJ** | 21 |
| ***Kiom da bananoj eblas en avio? (anonco)*** | 23 |
| ***ANONCETOJ*** | 24 |
| **NOVAĴOJ** | 24 |